

La Suda Kraco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 21.

Melburno (*Melbourne*), Aŭstralio.

10 Marto, 1922.

Tasmanian School Teaches Esperanto.

As the result of a judicious exposition of the merits of Esperanto and advantages to be derived from a knowledge of it, some of the senior pupils of the "Eaton Bray" School expressed a wish to learn the language. The lady principal, Miss C. M. Hannaford, D.B.E.A., has accordingly commenced a course.

This is the first school in Tasmania to establish an Esperanto class, and it is confidently expected that it will have far-reaching effects.

"La Suda Kraco" Traduka Rondo.

This translation group has completed six months' work. The painstaking members have shown steady improvement, as a result of the leader's helpful explanation of difficulties. There is no reason why the Rondo should be limited to those at present enrolled. New members may join at any time. The hon. secretary, Box 1367, P.O., Elizabeth Street, Melbourne, will supply information on request. A few sets of past papers, comprising set piece, leader's translation and notes, may be obtained at 1/- per set.

A.N.A. to Consider Esperanto.

The annual conference of the A.N.A., which this year will be held at Mildura, will consider a motion of which notice has been given by three branches, that the Association request the Victorian Education department to introduce the teaching of Esperanto into state schools. Esperantists who are members of the A.N.A., or who know delegates to the Conference should lose no opportunity of placing before the delegates information as to the merits of Esperanto and the benefits that would follow the teaching of it in our schools.

Here and There.

During the current session a petition will be presented to the Japanese parliament asking that Esperanto be taught in the elementary schools.

More than half of the students of the Otani Buddhist University at Kioto, Japan—the largest of that particular sect in Japan—have taken up the study of Esperanto.

The Chambers of Commerce at Temesvar, (formerly a part of Hungary, but now included in Rumania), and Gefle, Sweden, have by resolution approved of the use of Esperanto in commercial correspondence with other countries.

Kroniko.

Melburno, V. — S-ro Renfree, Patrola kondukanto de la Unua Norda Fitzroy'a trupo de Knabskoltoj, kiu estas kunligita kun la preĝejo de Sankta Luko, instruas Esperanton al iuj de la plej aĝaj skoltoj. La klaso kunvenas ĉiun merkredon ĉe la Sanka Luka Lernejo, je la oka.

Mont Albert, V. — Ĉi tiu grupo vigle laboradas. Oficistoj por la nuna jaro estas, — Prezidanto, f-ino Sinnotte; Sekretario, f-ino McCleverty; Kasisto, s-ro Roddick; Bibliotekisto, f-ino Blyth.

London, 27an de Februaro, s-roj Pyke kaj Rawson parolis pri siaj spertoj en Eŭropo kaj montris tre interesajn lumbildojn, en Halo Surrey Hills. Tiun paroladon aranĝis la Grupo Espero. Inter la ĉeestantoj troviĝis membroj de la Lerneja Komitato, (School Board), la Regiona Asocio por Progreso, (Progress Association), kaj kelkaj ŝtataj Lernejoj instruistoj. La sumo de £3/0/1 kolektiĝis por la Eŭropaj Malsatantoj.

Malvern, V. — S-ro H. Byatt priparolis Esperanton antaŭ kunveno de Malverna Klubo por Knabinoj, (The Malvern Girls' Club). Ĉirkaŭ 40 ĉeestis kaj multaj ekinteresiĝis. Dek du petos la Prezidantino de la klubo, ke ŝi permesu la starigon de studgrupeto. F-ino Byatt kaj kantis kaj deklamis esperante, tiel ĉarme ke ŝi ricevis koran aplaŭdon.

Oakleigh, V. — Okazis en Marto, ĉe la domo de s-ino. Bigelow, plena kunsido de anoj de la East Malvern kaj Oakleigh grupoj. Oni unuvoĉe aprobis la proponon unuigi la du grupojn. Oficistoj kaj komitato estas elektiĝaj, kaj la nova grupo alprenis la nomon, "La Iru Antaŭen Grupo," Oakleigh. Dek sep anoj registriĝis, kaj la oficistoj estas: — Prezidantino, s-ino Bigelow; Vic-Prezidanto, s-ro R. Cohen; Sekretario, s-ro J. Parker; Kasisto, s-ro H. Byatt; Korespondanto, s-ro T. O'Leary; Komitato, f-ino M. Martin, s-ro C. Simpson. Laŭ unuvoĉa decido la grupo aliĝos al la A.E.A.

Porepunkah, V. — F-ino. Hudson instruas novan grupon de ses anoj.

Mangawhare, Nov-Zelando. — Bonan progreson oni raportas el ĉi tiu regiono. Multaj novaj lernantoj en Dargaville kaj ĉirkaŭaĵo.

La Esperanta Klubo Melburno regule kunvenas ĉiusemajne ĉe 37a Strato Flinders kaj bone kreskas. En la lasta tempo la kunvenoj okazas ĉiun vendredon, sed komencante la 29an de Marto oni kunvenos ĉiun merkredon. Tiu ĉi aranĝo evitos la du gravaj grupoj kunvenu vendredon. S-roj Pyke kaj Rawson, la prezidanto kaj sekretario de la klubo raportas kontentigajn rezultojn pro siaj propagandaj paroladoj en la antaŭurbo.

Sidnejo, N.S.K. — S-ro Antonio Launaro el la Itala Ekzerca ŝipo "Libia," dum la ŝipo estis en la ĉinia haveno, en la nomo de la "tutmonda societo de Italujo" sendis "sian" varman kaj ameman bondeziron al la Australazia Esperanta Societo.

Rabaul, Nov-Gineo. — La Nov-Gineo Esperanto-Grupo estis formalde starigita. Ĝi kunvenas en Rabaul. S-ro Maurice Hyde estas Prezidanto kaj s-ro F. T. Simon, Sekretario. Gratulojn al la nova grupo pro la entuziasmo kaj esperanta eminenteco de ĝiaj fondintoj. La grupo decidis filiigi kun la A.E.A.

Nov Zelando. — Grupoj nun regule kunvenadas en Auckland, Wellington, Christchurch, Whangarei, Palmerston North kaj Greymouth. Ĉiun informon oni povas ricevi skribante al 102 Symond Street, Auckland aŭ 88 Tory Street, Wellington.

Princo Radu kaj la servulino.

Diras princo Radu: "Kisu min, v-bela,

Kaj mi vin ornamos per rubandoj juvela."

"Via orrubando brilu al ĉielo,

Sed la amon mi ne donas por juvelo."

"Kisu min, knabino, ĉar al vosto ĉevala

Mi vin ligos, pelos ĝis la morto pala."

"Al ĉevala vosto vi min povas ligi.

Tamen ne al amo malhonor-devigi."

"Hej, al mi ĉevalon!" — Ĝi hufbataron. —

"Kisu min, knabino, evitu suferon!"

"Ne! Tra ŝtonoj, rokoj pelu min sovaĝe;

Post honesta vivo mi mortos kuraĝe!"

Aŭdas princajn vortojn ĉiu kortegano:

"Mia princo-edzino estu ĉi infano!"

Dimitrie Cosmad Bolintineanu.

Recenzo.

La Patrie Ladine, adreso Itala Katedro de Esperanto, Bologna, via de Combruti, 48 paĝa hektografiita ĵurnalo (3 ekzempleroj kuniĝitaj) kiu laŭ Esperanta resumado "estas la sola intertempa publikaĵo por loĝantaro da 700,000 personoj, kiu uzas ĉiutage la Friulan, skribita, per la idiomo de la popolo. La lingvo oficiala estas milsimila de la Friula almenaŭ samgrade kiel la novlatinaj lingvoj," malsimilas unu la alian. Verŝajne la vojo de la novveninto nek estis nek estos glata, "ĉar iuj senbriduloj promesis detrui la presejon se ĝi kuraĝus publikigi solan vorton de lingvo Friula per Esperantaj," literoj! Ni ne povas juĝi pri la neceseco de la nova publikaĵo, sed ĝi asertas, ke ĝi estas "kvankam senbrua, akra poresperanta" batalanto. Ĝis oni povas juĝi per la Espa. resumado la enhavo, kvankam interesa por la supre cititaj 700,000 personoj ne samgrade interesus Esperantistojn, eĉ kvankam ili povus kompreni ĝin, oni diras ke "al mia filino" estas ĉefverko de poeto Favetti "inda je bona traduko en Esperanton." Eble en bona tempo Friula Esperantisto faros tiun tradukon.

"Alegorioj el la Naturo."

A second and enlarged edition of the translation of Mrs. Gatty's charming book, "Parables from Nature," by our well known Australian samideano, "Gego," is now in the press, and will shortly be published by the British Esperanto Association. Copies for sale will be available from the translator and from the Australian Esperanto Association.

Por Varbi Instruistojn.

Grava Esperanta Demonstracio, organizita de la Esperanta Klubo Melburna, okazos en Teachers' Training College, Grattan Street, Carlton, la 19an de Aprilo, (la unua merkredo post Paskolundo). La estraro de ĉi tiu kolegio tre interesiĝas pri la internacia lingvo kaj promesas bonan aŭdantaron de junaj instruistoj. Esperantistoj estas kore invitataj ĉeesti.

Here and There.

The yearly congress of British Esperantists will be held in London, 2nd to 6th June, and will probably be the greatest and most important national congress of Esperantists that has yet been held in England. At least a thousand kongresanoj are expected, and it is hoped many from foreign lands.

The International Labor Office of the League of Nations has already taken up Esperanto as a practical agency, and issued three circulars. For examples write in Esperanto to the Bureau International du Travail, Geneva, Switzerland.

In Minisinsk, Siberia, on 29th May, the People's Theatre had an Esperanto evening, and gave an Esperanto translation of Chekov's "The Bear." Baku also reports Esperanto dramatics.

Tsaritsin has issued 5000 copies of an Esperanto grammar, and the Esperantists about Kronstadt have organised a co-operative company to publish Esperanto text-books.

Les Echos, a large commercial weekly, 2 rue Martel, Paris, announces that it will translate free any commercial letters or documents from or into Esperanto received by its advertisers.

The French Association for the Advancement of the Sciences at its congress in Rouen in August last, called upon all other like associations to examine into and form a conviction as to the technical merits or demerits of Esperanto, and to do what they can to bring about action and inform public authorities of their attitude.

The Italian Society for the Promotion of the Sciences, the highest organisation in that department in Italy, at its congress, 8th to 15th September, 1921, in Trieste, resolved to request all students and authorities to encourage the spread of Esperanto, and chose a committee to compile facts about the Esperanto movement and determine the best method of spreading it.

Bologne, Italy, has decreed the introduction of Esperanto as an optional study in all its public schools, some 100 classes, to begin 1st January, 1922.

Filatelato.

Estas surprize, ke la filatelistaj esperantistoj ne profitas je ilia konstanta renkontiĝo ĉe la grupkunvenoj. Ŝajne plena duono de aŭstraliaj esperantistoj estas ankaŭ kolektantoj de poŝtmarkoj; sed ili limigas sian interŝanĝadon al eksterlandanoj. Per ĉi tiu rimedo ili ricevas la plej oftajn poŝtmarkojn el unu aŭ, eble, du tri landoj kaj poste amasigas centojn da duplikatoj, kiuj plenigas leterkovertojn kaj skatoletojn, sed neniamaniere riĉigas la albumojn. Nemulte laborinte oni povus marĉandi ĉi tiujn duplikatojn por nehavataj poŝtmarkoj el aliaj landoj. Oni povas rekomendi la metodon, kiun sekvas la filatelaj societoj. La poŝtmarkoj devas esti surgluitaj per teniloj sur folioj de papero. Super ĉiu poŝtmarko estas montrita la dezirita prezo. Alveninte ĉe ia kunveno la kolektantaj samideanoj interŝanĝas la foliojn. Nura momenta afero, kiu neniamaniere konkuris aŭ malhelpus la seriozan laboron de la vespero, nome, la studon de Esperanto. Hejme oni komparas la poŝtmarkojn sur la folioj kun sia mankolisto kaj formovas tiujn, kiujn oni volas, metante siajn komencajn literojn sur loko kie estis formovitaj poŝtmarkoj. Ĉe la proksima renkontiĝo ĉiu folio estas redonata al ĝia propra posedanto. La bilanco estas pagata aŭ per mono, aŭ per pluaj poŝtmarkoj, laŭ interkonsento. La prezon oni povas difini laŭkaprice, aŭ laŭ katalogo. Per la unua metodo oni povas kaj doni kaj ricevi bonaĉetojn, samtempe haviganta al si pli diversajn poŝtmarkojn, ol se oni interŝanĝadis nur rekte kun eksterlandanoj. Alia utilaĵo estas, ke ĉar per eksterlanda ŝanĝado oni ricevas poŝtmarkojn nur post longa atendo, ŝanĝado ĉe la kunveno estas ĉiusemajna, tial la intereso je poŝtmarkoj helpas la entuziasmon por Esperanto, kaj forigas ian malbonan inklinon al neregula ĉeesto ĉe la kunveno.

Mainland Teachers Interested.

State School teachers at Ngallo, in the Pinnaroo district, South Australia, and Winton, Victoria, have written to the Secretary of the Australian Esperanto Association for information regarding Esperanto, and for literature and text books on the subject.

S'ang'o De Koloroj En Aŭstralioj Pos'tmarkoj.

Pro la altiĝo de la tarifo sur poŝtajoj por la eksterlando, estis necese ŝanĝi la koloran kaj valoran kombinaĵon de iuj poŝtmarkoj. Tiel la 1d estos ĉokolada, anstataŭ verda; la 1d viola, anstataŭ ruĝa; la 1d verda, anstataŭ ĉokolada; la 2d, ruĝa, anstataŭ oranga kaj la 4d blua, anstataŭ viola.

La kvarpenca viola estis uzata nur dum mallonga tempo, kaj versajne ĝi fariĝos malofta kaj altvalora.

Jurnaloj subtenas Esperanton.

La journaloj en Aŭstralio pli kaj pli publikigas informojn pri Esperanto. En Melburno "Stead's Review" regule dediĉas paĝon al nia lingvo. En Sidnejo en "Australasian Manufacturer" en preskaŭ ĉiu ekzemplero havas artikolon pri ia Esperanta temo. Alia Sidneja ĵurnalo, "The Co-operative News," en du sinsekvaj eldonoj prialudis Esperanton kaj gratulas ĝin, ke ĝi elvekis grandan intereson en kunigadaj rondoj.

Brazilia Nacia Ekspozicio.

La Suda KrucO, en oktobro lasta, presigis unuan anoncon pri ĉi tiu grandioza ekspozicio. La aganta komitato eldonis 16-paĝan prospekton (22 x 26 centimetrojn) tute en Esperanto riĉe ilustritan de portretoj de homoj eminentaj en Brazilio de jaro 1822 ĝis la nuna, de vidaĵoj de Brazilio kaj plano ĝenerala de la ekspozicio sur golfeto Guanabara apud Rio. La prospekto plene resumas la dudek du erojn de la oficiala programo kaj donas detalan informon pri la naturo de la ekspozicio, kiun montras la rezultatojn atingitajn en ĉiu fako de la homaj scioj, arto kaj industrio. La ekspozicio komencos la 7-an de Sep. kaj restos malfermita ĝis la 15a de Nov. La prospekton oni sendis al la Komercaĵoj, ĉambroj de Aŭstralio, kaj la lokaj samideanoj disdonis multajn ekzemplerojn al fabrikantaj firmoj, kaj The Australasian Manufacturer donis bonan du paĝan represon de la ĉefa rubriko.

Kvankam Brazilio estas tre malproksima, ni esperas ke Aŭstralio estos bone reprezentata ĉe la ekspozicio. Ĉiujn informojn oni povas ricevi skribante al poŝta kasto N. 890, Rio de Janeiro.

Malantau la Pordo.

— Plenuminte mian devon, sinjoro — diris sinjoro Pickwick al sinjoro Nupkins — mi kun miaj amikoj nun adiaŭos vin.

— Havigu vian ĉapelon, Sam — li diris al sia servisto.

— Ĝi estas malsupre, sinjoro — respondis Sam, kaj li rapide malsupreniris por trovi ĝin.

Nu, estis neniu en la kuirejo krom la beleta domservistino; kaj, ĉar la ĉapelo de Sam estis mankanta, li devis serĉi ĝin; kaj la beleta domservistino lumigis al li. Ili devis serĉi ĉie por la ĉapelo. La beleta domservistino, pro sia zorgo trovi ĝin, surgenuiĝis, kaj esploris inter ĉiuj aĵoj amasitaj en angulo malantaŭ la pordo. Ĝi estis malfacila angulo. Por trafi ĝin ili devis antaŭe fermi la pordon.

— Jen, ĝi! — diris la beleta domservistino. — Tiu ĉi estas ĝi, ĉu ne?

— Permesu, ke mi rigardu ĝin — diris Sam.

La beleta domservistino metis la brandelington sur la plankon; kaj tial ke ĝi donis tre malhelan lumon, Sam devis surgenuiĝi antaŭ ol li povis vidi, ĉu ĝi vere estas lia ĉapelo aŭ ne. Ĝi estis rimarkinde malgranda angulo, do — kaj estis nenies kulpo, krom ties, kiu konstruis la domon — Sam kaj la beleta domservistino troviĝis neeviteble apude.

— Jes, estas ĝi — diris Sam — Adiaŭ!

— Adiaŭ! respondis la beleta domservistino.

— Adiaŭ! diris Sam, kaj dirante tion, li lasis fali la ĉapelon, la serĉado de kiu jam kaŭzis tiom da klopodo.

— Kiel mallerta vi estas — diris la beleta domservistino. — Vi denove perdos ĝin, se vi ne zorgos.

Tial, nur por malhelpi, ke li denove perdu ĝin, ŝi surmetis ĝin sur lian kapon.

Ĉu estis, ke la vizaĝo de la beleta domservistino aspektis ankoraŭ pli bele, leviganta al tiu de Sam, aŭ ĉu estis la okaza rezultato de ilia apudeco, estas necerta afero ĝis la nuna tago; sed Sam kisis ŝin.

— Vi ne kuraĝas diri, ke vi tion faris laŭintence — diris la beleta domservistino, ruĝiganta.

— Ne, ne tiun fojon — diris Sam

— sed mi nun tiel faros. Do, li denove kisis ŝin.

— Sam! — vokis sinjoro Pickwick, parolante super la balustrado.

— Mi venas, sinjoro — respondis Sam suprenkurante.

— Kiel vi prokrastis! — diris sinjoro Pickwick.

— Io estis malantaŭ la pordo, sinjoro, kiu malhelpis al ni malfermi ĝin dum longa tempo, sinjoro — Sam respondis.

Kaj tio estis la unua stadio en la unua amaĵo de sinjoro Weller.

(El "Pickwick Papers," de Charles Dickens, (1812-1870). Tradukis esperanten "Estie").

Universala Esperanto-Asocio.

Alvoko al Aŭstraliaj Membroj.

La asocio sendis al la Aŭstraliaj membroj la suban leteron:—

Permesu ke ni altiru vian atenton al jena fakto: kiel vi eble scias la financoj de UEA troviĝas en malbona stato ĉefe kaŭzita pro la falo de la plej multaj fremdaj monoj, la relative pli kara vivkosto en nia lando kaj la neebleco trovi novajn enspezojn. La 7a kongreso de UEA en Praha ne povis solvi tiun problemon, cetero tiom gravan ke estus vantaĵo postuli de ni solvon pri kies esencaj kaŭzoj vane diskutas la plej spertaj financistoj de la mondo: nome la monkurzoj. La ekonomia krizo kies konsekvencoj rimarkigas ĉie, minacas forskui nian organizaĵon tiom bone prosperintan kaj evoluintan. Daŭrigante la nunan vojon de ĉiujara defcito de **25 — 40 mil. frankoj** svisaj ni riskas ke post du aŭ tri jaroj UEA devus ĉesi, ne pro manko de membroj, sed pro la kontraŭo. Tio ŝajnas paradoksa; sed efektive ĉiu plia membro pligrandigas nian defciton. El la rimedoj uzataj por kontraŭi ni citas interalie: pligrandigo de la membroj-abonantoj kaj subtenantoj en landoj kun sama aŭ preskaŭ sama monrilato kiel Svislando.

Je tiu punkto ni permesas speciale atentigi vin: konante vin kiel malnovan esperantiston kaj fervoran amikon de UEA ni pensas ke vi volonte oferos kotizon pli altan por savi la tutan organizaĵon. Ne temas plu sole pri kreskigo de UEA sed pri ĝia daŭrigo kaj ekzisto. Tial ni estus tre dankaj se vi bonvolus aliĝi por

1922 kiel membro - subtenanto, pagante la duoblan kotizon de membro-abonanto. Esperante ke vi favore konsideros nian peton ni sendas al vi niajn samideanajn salutojn.

La Melburnaj membroj jam pagis siajn kotizojn, almenaŭ la plimulto el ili tion faris. La ceteraj . . . nun senprokraste agu!

La Asocio videble estas en financaj malfacilaĵoj kaj se la monhavaj membroj volas helpi laŭ la sugestio en la letero, ĉiu Aŭstralia delegito volonte ricevos la monon kaj laŭstatute tuj sendos ĝin al Genevo.

Se la Melburnaj membroj tion volas, la ĉefdelegito alvokos ilin al kunveno. Baldaŭa kunsido estas dezirinda por pridiskuti la situacion kaj interalie elekti vic-delegiton.

La Lingva Komitato.

La fakestroj por komuna kaj teknika vortaroj verkis raportojn. La akademia sekcio por la komuna vortaro intencas proponi al la Akademio publikigi la liston de preferindaj aŭ rekomendindaj radikoj. Ĝi ankaŭ intencas peti de la Akademio, ke ĝi denove proponu al pli detala ekzameno kaj pli funda esploro de la Lingva Komitato kelkajn radikojn kies signifo ne estas sufiĉe preciza kaj plenakorde fiksita, kvankam ili estas oficiale akceptitaj, ekzemple, **Administraci'**, **Akcesor'**, **Binokl'**, **Blok'**, **Emfaz'**, **Flagr'**, **Konfekci'**, **ŝose'**, **Verv'**.

La Akademio demandis al la Lingva Komitato ĝian opinion pri la litero Ĥ kaj pri la duonteknika sufikso **Oid** aŭ **Ojd**. La plimulto de la respondintoj preferas la formon **Oid** kaj aprobas la laŭvolan anstataŭigon de la litero Ĥ per la litero **K** en la okazoj, kiam ĝi senpere sekvas post la litero **R**.

La tuta proponita prepara listo por la 3a aldono estas akceptita de granda plimulto de la fakanoj.

Pri vortoj kun la pseŭdosufiksoj

Acio, Icio, Ucio multaj Lingv. Komitatanoj preferas la formon **-io**, sed la fine akceptita formo ŝajne ne povas sciigi ĝis la apero de aldono. La Direktanto dirante.

"Oni ne devas forgesi, ke 'Oficiala' vortaro efektive konsistas el du malsamaj partoj:

1o La propraj Esperantlingvaj radikoj;

2o Multaj ĝenerale (aŭ, pli ĝuste eŭropane) internaciaj radikoj, kiuj ne apartenante propre al nia lingvo, restas fremdaj vortoj kaj, laŭ la Fundamenta regulo, nur 'povas uzataj' de la Esperantistoj. Preskaŭ ĉiuj radikoj kun pseŭdosufiksoj estas fremdaj internaciaj vortoj, kiuj, oficialigitaj, tamen ne estas asimilataj kaj alproprigitaj al la Esperantlingva vorttrezoro. 'Oni devas diferencigi, skribas tre prave la Ĝenerala Komitato, inter vortoj plenrajte enkondukindaj kaj vortoj tolerindaj.'

Angla Akademiano rimarkigas, ĝenerale la Internaciaj vortoj estas internaciaj pli laŭ formo ol la signifo. Tiu ĉi tre simpla sed tre grava rimarko pravigas la oficialigon de la internaciaj vortoj, kiun kelkfoje rigardas kiel danĝeran aŭ almenaŭ senutilan: la oficialigo de tiaj vortoj servas por fiksi kaj internaciigi ilian signifon.

Jam en la 2a Oficiala Aldono Pro Cart kaj iliaj tiamaj kunlaborantoj tre prave dividis la oficiale aprobitajn radikojn en du listojn proksimume korespondantajn al la supremaj tritaj. La radikoj de la 1a Oficiala Aldono estos sammaniere dupartigitaj en la baldaŭ publikigota Akademio Plena Radikaro anoncita en la 3a aldono, kaj estas tre desirinde, ke tia dupartigo estu poste klare montrata en ĉiuj estontaj vortaroj.

Multaj L. K.anoj postulas, ke oni senbalastigu kaj kribru nian vortaron. Ni ĝuste povos profiti

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facilaj por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

okazon por kontentigi tiun tute pravan peton, ĉar la suprealudita dupartigo estas la plej bona kaj taŭga rimedo por efektiviĝi la deziratan kaj dezirindan senbalastigon."

Pri la teknika vortaro oni povas diri ke la kvindek tri fakanoj jam komencis sian laboron. La Direktoro diras, "... Ni do devas elekti, kiel unue tradukotajn, tiujn el la teknikaj vortoj, kiuj estas plej urĝe bezonaj. La ceteraj venos poste. ...

Ni speciale verku en ĉiu fako elementajn kaj poste pli detalajn lernolibrojn. Ni ĉerpu pri tio la tradukan materialon el la naciaj teknikaj vortaroj kaj el la jam eldonitaj provaj vortaroj, kiuj estis jam eldonitaj en Esperanto.

Tiuj lernolibroj ne bezonos esti verkitaj laŭ pedagogia vidpunkto, sed ĉefe kun la celo elekti la plej necesajn radikojn kaj praktike provi ilian uzeblecon. Ili eĉ ne nepre bezonas esti plene verkitaj kaj skribitaj, ĉar sendube la plimulto el ili neniam povos esti presita. Sufiĉos, se la celo de elektado kaj praktika provado aperos en formo de alfabetaj tabeloj, kun esperante redaktitaj klarigoj kaj eventuale komprenigaj ilustraĵoj. ..."

Progress in Europe.

In a recent issue the "Germana Esperantisto" gives a list of classes in schools and colleges, for policemen, postmen, teachers and members of Labour societies. The students number more than 700. Similar activity is reported from Poland.

Esperanto is now taught at the Royal National Institute, Bari, Italy, to 200 students.

In Budapest the Labour Societies are vigorously extending the use of Esperanto in Labour circles.

Under the auspices of the Hungarian Esperanto Society a course for Medical men has been successfully conducted by Dr. Mezei.

In Kaposvar Dr. Takacs has three classes, one for workers three times weekly, 62 students; one for office workers, twice weekly, 45 students; and one for commercial students, three lessons weekly, 21 students.

The Bulgarian Minister of Instruction has appointed seven additional Esperanto instructors for state schools.

Nova Lokomotivtipo Konstruita en Svedujo.

Ĉe la fame konata fabrikejo Ljungstrom, Svedujo, oni konstruis lokomotivon de tute nova tipo. Unue ĝi havas turbinojn, due ĝi densigas la vaporon. Dum multaj jaroj inĝenieroj el multaj landoj prilaboris tiun ideon. La preferoj de la nova lokomotivtipo konsistas en la bonekonomia uzo de ĝe rilate al la ordinara lokomotivoj, kaj plue en ĝia senbrueco. Pro la kostoŝparo oni certe komencos uzi la novajn turbinlokomotivojn anstataŭ la aliaj.

(Henning Halldor en "Esperanto Triumfonta").

Deziro.

P. K. Javorov.

La kapo pezas lacigita
En mia brust' nenia fort';
En la animo ĉagrenita
Mallumo estas kiel nokt'.

La luno brilas mediteme,
La maro dormas sub ventet',
Kaj ondoj plaŭdas sin dormeme,
Ĉe bord' luliĝas boatet'.

Kaj logo dolĉa min altiras,
Min vokas karesanta rev'
Al lok', neniŭ kien iras,
For al la land' de ĉarma rev'.

Kaj tie — ho, min dolĉe kisu
De ĉarma luno radiet';
Hararon la zefr' karesu,
Facile lulu min ondet'!

Trad. D. N. Grekov
en Bulgara Esperantisto.

Pri la Virinoj. Anakreon.

Naturo donis kornojn
Al bovoj, al ĉevaloj
La hufojn, al leporoj
Piedrapidon, faŭkon
Denthavan al leonoj,
Al fiŝoj la naĝarton,
Al birdoj lerton flugi,
Al viroj la prudenton.
Por la virinoj, ne plu
Defendrimedojn havis.
Ĝi kion ŝanĝe donis?
Belecon! Anstataŭe
De ŝildoj ĉiufarmaj,
De lancoj ĉiuspecaj.
Ja venkas feron, fajron
Virino ajna bela.

El greka lingvo tradukis:

H. Preaubert,
"Franca Esperantisto."

Finnland's Government Appreciates Esperanto.

The Finnish Parliament for the second year in succession has voted 25,000 marks to the Finland Esperanto Association, to further the study of Esperanto. It is estimated that every thousandth person is a live Esperantist. During the present year this is likely to be much improved upon, as the Fourteenth Esperanto Congress will be held in the capital next August.

XIV Universala Kongreso,

Helsingfors, la 6—12 de agosto 1922.

El La Dua Komuniko.

En la nuna jaro estos redonata, la ilustrita gvidlibro "Vojaĝado en Finnlando," kiu interese priskribas la vidindaĵojn de Finnlando. La teksto estos tute nova kaj pli-grandigita, kaj la ilustraĵoj multaj kaj belaj.

Dum la kongresa semajno ekskursoj verŝajne ne okazos, pro la longaj distancoj. Sed la LKK, en kunlaboro kun la Turista Societo de Finnlando, penos aranĝi diversajn turistajn ekskursojn antaŭ kaj post la kongresa semajno.

Filatelistoj Atentu! Kontraŭ 4 ŝilingoj aŭ 1 usona dolaro, mi sendas al vi 250 diversajn belajn poŝtmarkojn de Ĉeĥo-Slovakio, Hungarujo, kaj Aŭstrio. La monon oni povas sendi per bankbiletoj en rekomendita letero al tiu ĉi adreso: Johano Kratochvilla instruisto en Sered, (Ĉeĥo-Slovakio).

Gazetoj Ricevitaj.

Amerika Esperantisto, n-ro 5; Bulgara Esperantisto, n-ro 4; Bizantio, n-ro 5; Bulteno de la Franca Societo de Propagando de Esperanto, 5 rue Ravignan, Paris, n-ro 1. Eldoniĝis ĉiun trian monaton. Celas propagandilo por Esperanto interfrancilingvanoj, kaj tial uzas francan lingvon. Aparta aldono estas esperante redaktata. Espero Tezofia, n-ro 2; Esperanta Finnlando, n-roj 11, 12; Esperanto Triumfonto, n-ro 65; Espero Katolika, n-ro 13; La Esperantisto, n-roj 24-25; Franca Esperantisto, n-roj 11-12; Libera Esperantisto, n-ro 14; L'Esperanto, n-ro 1; Sennacieca Revuo, n-roj 3-4; Verda Utopio, tria jaro, n-ro 1; Verda Ombro, n-ro 11.

Al Niaj Subtenantoj.

Dum la monato ni ricevis kelkajn respondojn de niaj abonantoj rilate al nia peto, ke ili renovigu siajn abonojn, sed multaj ankoraŭ jam sendis. Ni tre dankas tiujn, kiuj faris donacojn, kiuj estis tre akceptindaj.

Ni ricevis la jenajn sumojn, kiuj danko:—A. E. Church, 5/-; P. Deane, 10/-; L. Spanner, 10/-; M. Healy, 5/-; Robinson, 1/-; V. J. Timmins, 5d.; H. Howard, 5/-; J. W. Green, 5/-; G. S. Thompson, £1; M. Dodd, 4/6; Sale of Gifts, Melburna A.E.A., £4 1/5; F. Ziegeler, 4/6; T. Cameron, 5/-; W. Whitehead, 2/-; A. D. Nicoll, 10/-; G. D. Kvareström, 10/-.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

Free to You.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by Fraser & Morphet, Printers, Eastbourne Street, Windsor.